

Gravaj dokumentoj, pri verdaj rezultoj, okazajhoj, rilato inter la Verdaj Partioj kaj Esperanto

Estus bone se samideanoj el diversaj landoj sendu la raportojn pri siaj Verdaj Partioj. Mi petas pardonon, ke la elekto estas iom hazarda, kaj chefe temas pri Europo.

==

2018-04-15 Hungario denove elektas Orban – Verduloj sukcesis eniri la parlamenton  
Lehet Mas a Politika gajnis 6,99% .  
Bernadett Szel reprezentos la verdulojn en la Parlamento – Gratulon al tiu malfacila posteno.  
Ilia retpagharo en la hungara: <https://lehetmas.hu/>

==

2018-03-27 GroenLinks plej favore elektita en 13 nederlandaj urboj  
Vi povas rigardi la intervjuon kun Jesse Klaver:  
<https://europeangreens.eu/news/jesse-klaver-be-movement-change-europe>

2018-03-23 Elizabeth May (MP, Kanado) malliberigita pro protesto:  
Shi, la gvidanto de la Verda Partio kaj iama kandidatino por prezidento, protestis kontraŭ nafto-dukto trans la montaro en British Columbia.  
Post la samtaga liberigo shi argumentis, ke la firmao Kinder Morgan ne atendis la jurkortuman decidon pri tiu naftodukto, kaj tial rajtas protesti kune kune kun la regionaj indigenaj popoloj, i.i. Skvamish\* , kiuj defendas sian rajton kaj hejmlandon. Ne-perforta civila ne-obeemo estis la sola ebleco por ili - char ekz-e pri klimato-shangho chefe afliktas nature vivantajn popolojn.  
(unue lau informo sur Fejzbuka pagho de Global Greens)

<http://elizabethmaymp.ca/publications/2018/03/23/non-violent-civil-disobedience-is-not-the-easy-choice-but-its-the-right-one-says-elizabeth-may/>

\*) eble vi iam legis la faman paroladon de tribestro de Skvamish, Seattle, en la jaro ch. 1856.

==

**2018-01-17 Francio, rezignas pri nova flughaveno apud Nantes – Gratulon al Verduloj kaj naturamikoj**  
Notre-Dame-des-Landes estas urbeto okcidente de Francio, situanta en la regiono de Loire-Atlantique, regiono Pays de la Loire. La projekto konstrui flughavenon sude de la urbo estis lanĉita en 1960. Neaktiva pro la petrolo-krizo de la 1970-aj jaroj, ĝi reviviĝis en 2000. Fine de 2007, la projekto konfirmiĝis, malgraŭ la anonco de la haltigo de iu ajn kreado de flughaveno farita dum la renkontiĝo « Grenelle de la naturmedio » en Parizo de tiu sama jaro. La dekreto formaliganta ĝin estas publikigita la 10-an de februaro 2008.

La projekto havas defendantojn, kiuj diras, ke ĝi estas rimedo por ekonomia evoluo. Sed ankaŭ ekzistas multaj kontraŭuloj kaj forta mobilizo, kiu kreskis dum la lastaj jaroj. Ĉi tiuj kontraŭuloj diras, ke la projekto estas netaŭga (la nuna flughaveno, situanta proksime en la urbo Nantes, jam estas maltro uzata), ke ĝi estas malŝpara, forigos terkulturajn laborpostenojn, kaj detruos la lokan naturan medion. Ĝi tuŝas unu el la lastaj heĝaj kamparaj areoj en malseka terpeco en Francio. Ekde sia komenco, la projekto estis la temo de multaj diskutadoj kaj peripetioj.

La 17-an de januaro 2018, la projekto konstrui novan flughavenon estis definitive forlasita. Necesis 50 jaroj por faligi ĝin.

Unu el la aktoroj de ĉi tiu mobilizo, Eŭropa Ekologio La Verduloj (EELV), publikigis ĉi tiun gazetarman komunikon, kiu substrekas ĉi tiun ekzemplan sukceson, akiritan post longa batalo. EELV estas franca ekologio partio. La persistemo ĉiam pagas .

Jen ligo al la plena artikolo de la Esperanto-Komisiono ene de EELV:

<https://esperanto.eelv.fr/2018-la-persistemo-pagas-ciam/>

==